

La Merkato

ISSN 0941-9306

Enkonduko

En la raporto pri la ĝenerala kunveno vi legos pri la planata datumbazo de IKEF-membroj. La preparoj okazas, sed la projekto estas pli komplika kaj pli temporaba ol oni antaŭvidis. Mi antaŭvidis aperigi detalojn pri ĝi en la nuna numero (i.a. pro tio ĝi aperas kun iom da prokrasto), sed ne eblis. Mi nun esperas ke la informoj estos en la venonta numero. Mi ankaŭ tuj komunikos ilin en la rubriko 'aktuale' de la IKEF-retpaĝoj.

IT

Enhavo

Raporto pri la ĝenerala kunveno en Pekino	3
Komercaj petoj kaj proponoj	6
Laborplanoj - Jukos	8
Novaj membroj	9
Terminologio	10
Interesaj broŝuroj eldonitaj de la Eŭropa Komisiono	11
Fotoj de la ĝenerala kunveno	12
Rimarkoj pri la 'Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en naŭ lingvoj (Z. Hinŝt) - parto 1	13

La Merkato (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNISS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi **Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco Polerani. **Centra sidejo:** Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: [roland.rotsaert\(a\)pandora.be](mailto:roland.rotsaert(a)pandora.be).

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoŝtanco) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*

- belga poŝtekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

Perantoj

Internacie: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto [financoj\(a\)fel.esperanto.be](mailto:financoj(a)fel.esperanto.be))

Brazilo: Silvio KNISS MATES ([silvio\(a\)siscobras.com.br](mailto:silvio(a)siscobras.com.br); Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn)

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto [efikso\(a\)aol.com](mailto:efikso(a)aol.com)

Germanio: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto [f.j.braun\(a\)t-online.de](mailto:f.j.braun(a)t-online.de)

Hungario: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, [istvan.gether\(a\)office.ksh.hu](mailto:istvan.gether(a)office.ksh.hu)

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto [g.polerani\(a\)tiscalinet.it](mailto:g.polerani(a)tiscalinet.it) (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto [syama\(a\)qf6.so-net.ne.jp](mailto:syama(a)qf6.so-net.ne.jp) (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

Raporto pri la Ĝenerala Kunveno de IKEF en Pekino je 2004-07-29

Rekorda nombro de 107 personoj (30 membroj kaj 77 interesitoj) ĉeestis je jaŭdo 29 julio 2004 la Ĝeneralan Kunvenon de IKEF kadre de la 89a Universala Kongreso en Pekino. Pri tiu alta nombro sendube respondecis nia ĉina estrarano kaj peranto s-ro WANG Tianyi, kiu antaŭe multe reklamis inter sia konatularo pri tiu okazaĵo. Jen la agendo de la kunveno:

1. Raporto de la prezidanto pri la agado de IKEF en 2003
2. Financa Raporto por 2003
3. Decido pri la uzo de la profito de 415,99 eŭroj
4. Malŝarĝigo de la estraro
5. Elektaj al la estraro
6. Prelego "Praktiko kaj problemoj en la esperanta komerco" de WANG Tianyi
7. Diskuto pri celoj, taskoj kaj agadoj farotaj de IKEF
8. Diversaĵoj

Ĉe la estrara podio sidis la estraranoj s-ro Franz Josef BRAUN (prezidanto), prof. Ooba Atsuo, s-ro WANG Tianyi kaj la revizoro d-ro Gianfranco POLERANI. Pardonpetis sian neĉeeston la ceteraj estraranoj s-ro Silvio KNISS MATES, d-ro Rainer KURZ kaj s-ro Roland ROTSAERT.

Komence de sia raporto, la prezidanto donis superrigardon pri ĉefaj datumoj kaj agadoj de la fakgrupo, kiu estis fondita je 6 aŭgusto 1985 en Augsburg de li kaj s-ro Lawrence Mee, brito tiam loĝinta en Nederlando. Ĝenerala celo estas akceptigi kaj disvastigi la Internacian Lingvon Esperanto en la kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomiko per praktika uzo de la lingvo. En 1994 IKEF ricevis la statuson de "Faka Asocio aliĝinta al UEA". Per tio ĝi rajtas delegi apartan membron en la Komitato de UEA. Tiun taskon ĝis nun daŭre faras nia revizoro d-ro Polerani.

El la ĉefaj agadoj laŭ Statuto kaj Laborplano la prezidanto akcente menciis la komercadon inter esperantistaj komercistoj – kiu havas en la ĉi-jara kongresa lando specialan signifon -, eldonadon de fakaj terminaroj kaj faklibroj, verkado de fakaj artikoloj en la magazino "Monato" kaj peri kaj aperigi reklamanoncojn de entreprenoj en "Monato".

Koncerne la raporton pri la agado de IKEF en 2003 Braun referencis al la presita raporto en "La Merkato" n-ro 84 de aprilo 2004 kaj menciis nur la plej gravajn erojn. Malbona afero estas falo de la membronombro ĉefe pro eksigo de membroj fare de la estraro pro

nepago de la kotizo. La verka agado restis samnivela kiel en la antaŭaj jaroj. Pozitive estas ankaŭ ke lastjare en Gotenburgo la IKEF-anoj povis viziti laŭ invito de membro Bo SANDELIN la Komercon Altlemejon, parto de la Universitato Gotenburgo. La komercado inter esperantistaj komercistoj kreskis, precipe instigite de la ĉinaj membroj. IKEF daŭre senpage publikigas en "La Merkato" kaj en sia retejo www.ikef.org ofertojn kaj proponojn pri varoj kaj servoj. Al tio helpas ankaŭ la retlisto [per-esperanto-komerco-informoj\(a\)yahoogroups.com.br](mailto:per-esperanto-komerco-informoj@yahoo.com.br), administrata de nia brazila membro Fabrício VALLE.

Menciinde estas ankaŭ la intervjuo kun la germana Nobel-laŭreato pri ekonomio, profesoro Reinhart SELTEN, fare de d-ro Rainer KURZ. Braun rekomendis la aĉeton de tiu videobendo havebla en la kongresa libroservo. Pro manko de laborfortoj iom lamis la terminara/terminika laboro. Estas por ĉiu faka asocio grava tasko aktualigi fakajn terminarojn. La prezidanto alvokis la ĉeestantojn al kunlaboro en tio, sen ekkonebla rezulto.

Pro neĉeesto de la Financa Konsilanto, s-ro Roland ROTSAERT, la prezidanto ankaŭ klarigis la ciferojn de la spezokonto kaj bilanco por 2003. Post du jaroj kun malprofito, en 2003 oni faris denove modestan profiton. La kaŭzo por tiu profito venas el neelspezo por terminaraj eldonaĵoj, kio havas negativan aspekton. La membroj sekvis la proponon de la estraro por aldono de tiu profito de 415,99 eŭroj al la kapitalo. Ili ankaŭ, kun escepto de unu sindeteno, laŭ propono de d-ro Polerani voĉdonis por la malŝarĝigo de la estraro.

Polerani ankaŭ gvidis la procedon de elekto al la estraro. Finiĝis la dujara deĵorperiodo de prezidanto Braun kaj de la estraranoj Kurz kaj Wang. Ĉiuj denove kandidatiĝis – Braun kun la escepto por nur unu plia deĵorjaro (li denove anoncis sian retiriĝon venontjare, tiam 20 jarojn en tiu ofico) -, aliaj kandidatoj ne anonciĝis. La kunveno elektis, kun escepto de unu sindeteno, la tri kandidatojn.

Post tiuj laŭstatutaj procedoj sekvis la parto de diskutado. Ĝi estis malfermita per la prelego de estrarano WANG Tianyi el siaj spertoj pri "Praktiko kaj problemoj en la esperanta komerco". Laŭ Wang ĉinaj esperantistaj komercistoj estas plej aktivaj; ili komercas kun landoj en Afriko, orienta Eŭropo kaj aliaj landoj en Azio, sendas eĉ kontenerojn de diversaj varoj alilanden. Sed li ankaŭ menciis perdojn pro ne sufiĉaj spertoj de kelkaj personoj. Por solvi tiun problemon, Wang postulis ke UEA kaj IKEF kreu esperantajn faklernolibrojn kaj organizu fakan edukadon pri la internacia komerco. Li plendis ankaŭ pri tio ke eŭropaj esperantistoj ne tiom aktive komercas, kaj li proponis ke ili invitu ĉinan delegacion tien. Krome IKEF uzu la plej modernan teknikon kaj regule okazigu surretajn kunvenojn kaj foirojn.

Aldone al tiu enkonduka prelego, prezidanto Braun voĉlegis leteron de la brazila membro s-ro Fabrício VALLE, administranto de la retlisto "per-esperanto-komercinformoj". En sia mesaĝo s-ro Valle substrekiis la gravecon de la profesia apliko de Esperanto kaj li alvokis al "plifortigo de la t.n. intraesperanta ekonomio". Por superi la nunajn problemojn (manko de granda merkato, esperantistaj entreprenistoj kiuj agas tro izolite, manko de spertoj kaj strukturoj por komercado) la pli aktiva uzado de tiu retlisto povas antaŭenigi la planon.

Al la demando de s-ro MIYOSHI Etsuo pri la uzata lingvo en la kontraktoj, Wang respondis, ke la kontraktoj ĝenerale estas en Esperanto, sed la transportajn dokumentojn plenumas la transportaj entreprenoj en angla lingvo. S-ro Michael CWIK ankaŭ diferencis inter kontakto kaj kontrakto. Kontakto estu en Esperanto, sed por kontrakto kaj reklamo estas rekomendinda trilingva vortumado: nacia lingvo + angla + Esperanto. Tiel agas ekzemple nederlanda firmao. Per tio la angla kiel nuna internacia komerca lingvo estas uzata, sed Esperanto kiel aldona lingvo estas prezentata al la publiko. S-ro YONG Fang mencias, ke sia firmao havas oficejon en Vietnamio kaj uzas nur Esperanton.

S-ino Eruda Li el Hongkong raportis pri planita fondo de Ĉina Komerca Esperantista Asocio por pli kunigi la ĉinajn esperantistajn komercistojn. Ekestis en la plia diskuto la demando, kiel tiu asocio agu kun aŭ kadre de IKEF. S-ro Harald SCHICKE, profesie naturkuracisto kaj komercisto pri aziaj naturaj medikamentoj, proponis kontakton por interŝanĝi spertojn. S-ino Anne TILMONT konatigis al la ĉeestintoj sian sistemon Tsunami/Cunamo pri vendado de varoj Nu Skin. Ĉar kiel aldonaĵo en La Merkato n-ro 85 de julio 2004 troviĝis la esencaj enhavoj de tiu sistemo, ne necesas ĉi tie detale raporti.

Ekestis denove la demando pri la bazaj membroinformoj en IKEF. Prezidanto Braun respondis, ke la estraro ĵus decidis pri taŭga sistemo de elektronika datumbanko pri la membroj, kaj ankaŭ estas trovita persono kiu faras la programigon de ĝi.

En la kunveno aliĝis al IKEF ses novaj membroj el Ĉinio, Koreio kaj Pakistano. Vendiĝis eldonaĵoj de IKEF en la valoro de 445 juanoj (44,50 eŭroj), inter tiuj "Inkotermoj 2000" kaj "Dokumentaj Kreditoj", do verkoj kiuj povas parte plenumi la postulon de s-ro Wang pri faklernolibroj. Plie oni prezentis la "Borsan Terminaron" de Hans Wiersch, promociata de IKEF.

FJB

Du fotoj pri la kunveno videblas je p. 12.

Komercaj petoj kaj proponoj

Regule la prizorganto ricevas peton por sendi la liston de retadreso de la IKEF-membroj. Tamen, pro la ofta misuzo de tiuj adresoj, li preferas ne plu doni ilin. Li sugestas ke, krom la eblecoj de la IKEFa forumo kaj La Merkato, anoncantoj diskonigu siajn ofertojn pere de la ekzistanta Yahoo-grupo. Eblas aliĝi sendante mesaĝon al [per-esperanto-komercinformoj-subscribe\(a\)yahoogrupos.com.br](mailto:per-esperanto-komercinformoj-subscribe(a)yahoogrupos.com.br).

Argentino

Ni havas metalan entreprenon en Argentino kiu fabrikas elektrajn kablojn kaj metalajn pletojn. Ni volas trovi vendistojn en Hispanio (eble ankaŭ en aliaj landoj). Vi povas vidi niajn produktojn en www.racksa.com. Retadreso: impsa(a)ba.net. Kontaktpersono: José Luis Dieguez.

Bjelorusio

Henadzi KURHUN proponas jenajn servojn:

- konsultado pri ekonomia situacio kaj leĝaro de Bjelorusio;
- merkatesploro (precipe industriaj kaj konstruaj varoj) en Bjelorusio (ĉijare mi sukcese finis similan laboron por granda pola konstrua firmao);
- serĉo de necesaj kontaktoj kun firmaoj en Bjelorusio (precipe en Grodno);
- organizado de renkontoj en Grodna Ekonomia kaj Industria Ĉambro (Bjelorusio);
- organizado de renkontoj en Regiona Ĉambro Industria en Lublin (Pollando);
- turismaj ekskursoj en Grodno;
- tradukhelpo en Bjelorusio;
- aliaj interesaj proponoj.

Lingvoj de kontaktoj: esperanto, rusa, bjelarusia, pola, ukraina, germana. Portebla telefono: +48 693 202 271 kaj retpoŝto: kurhun(a)inbox.ru.

Bulgario

Jam finiĝis la Internacia Aŭtuna Foiro en Urbo Plovdivo, Bulgario. Ĝin partoprenis 2800 firmaoj el 45 landoj. Lastan fojon mi petis detalajn proponojn aŭ demandojn por helpi vin, sed bedaŭrinde neniu reagis. Sekvonta estos en la printempo; bulgaraj esperantistoj havos budon en ĝi! Lasto Nikov, lasto11(a)yahoo.co.uk, BG-1000 SOFIO, P.K. 497.

Ĉinio

Ofertu ĉinan **artfajron kaj petardon** (fireworks/firecrackers/petard)! Vi povas pagi post vendo. Kontakto: informo(a)komerco.com, www.komerco.com.

Mi havas proprajn **vojaĝagentojn kaj presejon** en Ĉinio. Mi povas presi bonkvalitajn kolorajn aŭ nigra-blankajn presadojn kun favora preskosto. La kompilantoj nur simple sendu rete la finpretigitajn tekstojn. Niaj pres-maŝinoj (aĉetitaj de Germanio) povas elkoni preskaŭ ĉiujn retajn kompajn-sistemojn. Post la ricevo de teksto, ni bezonas nur 5 ĝis 7 tagojn por finpresi (la eldona kvanto estu malpli ol 20000 ekzempleroj). Ni deziras ankaŭ prizorgi la dissendadon. WANG Xigeng, Chizhou China Travel service, No.11, Changjiang Road(S), Chizhou, Anhui, CN-247100, telefonoj: ++ 86 566 319717, ++ 86 139 0566 9864, faksilo: ++ 86 566 2031155, rete: wxgespero(a)hotmail.com, wxgespero(a)vip.sina.com.

Ĉinaj ŝipkonstruaj kompanioj volas urĝe aĉeti grandajn **ŝip-dizel-motorojn** 5000 - 7000 kW. Via propono estas bonvena ĉe ĉina peranto de IKEF, s-ro WANG Tianyi (Ĉielismo), fakso: 0086-29-8262-2952, tel.: 0086-29-8224-2215, rete informo (a)komerco.com.

S-ro Fu Guoqing, urbo Haerbin, retadreso kolektanto2000(a)yahoo.com.cn, volas aĉeti **vorojn el Rusio**.

Metalurgian bulan **manganan ercon** (metallurgical lump manganese ore) ni importas grandkvante. Formato: MMD, manganeco ĉirkaŭ 44%. Ni atendas vian reagon kun indiko de kemia konsisto kaj minimuma kvanto. S-ro WANG Tianyi, informo(a)komerco.com, komerco(a)public.xa.sn.cn, www.komerco.com.

Kongo-Brazzaville

Mi starigis malgrandan entreprenon DIALUBOUG ESPERANTO kun malsimilaj servoj. Inter ili: fotografio, vendado, ktp. Mi deziras grandigi iom post iom tiun entreprenon. Kiu deziras kunlabri kun mi pri komerco kontaktu mi je mia telefonnumero: (00242) 526 63 53 aŭ rete je dialubourg(a)yahoo.fr. Adreso de la oficejo: Michel DIALUNAMA, Immeuble Angola libre (ex-Centre Culturel Angolais), Makele-kele, Brazzaville, aŭ: PHOTO ESPERANTO, 98, Rue Banda, Potopoto, Brazzaville, Congo.

Kongo-Kinshasa

Ankoraŭfoje mi insistas kaj alvokas komercistojn kiuj interesiĝas pri komerco en Afriko. Ni antaŭ nelonge informis pri nia kreita firmao en Kongo-Kinshasa. Ni estas tri kunposedantoj, du el Kongo, loĝantaj en Eŭropo kaj unu polino. Unu el ni vojaĝis al

Kongo por registri nian firmaon 'ABC' 'African Business Center'. Ni jam akiris permesilojn por ĝenerala komerco kaj nia lando permesis importi kaj eksporti ĉion. Ni ankaŭ posedas 700 hektarojn kiuj havas ĉiujn specojn de arboj por arbara ekspluatado. La posedantoj de ABC estas: s-ro Moliere Ngangu (kongano), s-ro Antoine Keto Mfumu (svedo konga-devena) kaj s-ino Barbara Liberska (polino). Kontakto: S-ro Moliere Ngangu Nduantoni, ul. Zwirki i Wiguri 17/2, PL-85-310 Bydgoszcz, Pollando, tel.+48-504820080, rete: afrobuscenter(a)yahoo.fr.

Tanzanio

Mia entrepreno akiris la rajton por rikolti 40 hektarojn de tektono-arboj (Teak/Tectona grandis) en Pangani Distrikto, Tanga Regiono en Tanzanio. Ni ne nur vendas lignon en kaj ekster Tanzanio sed ni ankaŭ aktivis kontraŭ la detruo de la naturo kaj agas por la restarigo de la ekosistemo. Ni atendas vian favoran eĥon. Abubakar Matabaro M., direktoro ĝenerala, Loyal Enterpreno, P.O. Box: 14187, Dar-es-Salaam, Tanzania; Tel. 255 745 4629 70 kaj 255 748 605576, retadreso matabaro35(a)hotmail.com .

Laborplanoj

Mi petas vin komenci pensi pri la laborplano, ne pri tiu de UEA, sed pri via laborplano, pri tiu de via landa asocio, loka aŭ faka grupo. La estraro de UEA intertempe progresas por organiziĝi pri la laborplano de UEA mem. La tekston de la laborplano de UEA vi povas legi en www.tejo.org/uea. Klaku sur "laborplano de UEA".

Esence ni ĉiuj devas okupiĝi pri informado, instruado kaj utiligado, provante pli profesiigi, plijunigi kaj pli tutmondigi la Esperanto-agadon, ĉiu en sia medio. Mi petas, ke ĉiu organizaĵo petu unu el siaj membroj okupiĝi pri starigo kaj sekvado de laborplano. Tiuj membroj bonvolu aliĝi al la listo [labor-plano-de-uea\(a\)yahogroups.com](mailto:labor-plano-de-uea(a)yahogroups.com) kaj bonvolu raportu tie de tempo al tempo.

Ni estas formikoj, kiuj decidis batali kontraŭ elefantoj. Pro tio ni devas esti tre organizitaj kaj celkonsciaj, sed ankaŭ ne forgesu, ke ni estas pravaj formikoj, kiuj batalas kontraŭ perfortaj elefantoj, kiuj volas vori ĉiujn formikojn de la mondo.

Renato Corsetti

Jukos

Mallonga, sed bona artikolo pri la rusa petrol-kompanio Jukos troviĝas je www.comlink.apc.org/ave/jukos.htm (retpaĝoj de AVE, la esperantistaj verduloj). (rr)

Novaj membroj

331. S-ro Altaf Gohar KHAN, Suite 5, 4th Floor, Ginza Centre, Blue Area, PK-ISLAMABAD, Pakistano, °1955, tel./fakso +92-51-2273243, rete al_gohar(a)hotmail.com

332. S-ro Manel VINYALS - ABC ENCIKLOPEDIOJ, S.L., Maestrat, 18, 1?, ES-43560 LA SENIA (Tarragona), Hispanio, tel./fakso: ++34977576470, rete consultor(a)abc-pack.com

333. S-ro LIU Weizhuang, Sanyuanli, Fei-e-xi-lu, Nan-1-jie 18-602, CN-510405 Guangzhou, Ĉinio, °1955, tel./fakso: +86-20-86361315, rete liuweizhuang(a)hotmail.com

334. S-ino WU Qianli, Nan-Yijing-Lu, Yijing-Dongsanjing 5 Hao 606 Fang Zhuhai-Qu, Guangzhou Dadao, CN-510600 Guangzhou, Ĉinio, °1966, tel./fakso:+86-20-61231971, mobila:13922115364, rete emily(a)fp-tree.com

335. S-ro FANG Yong, Huangmugang Beiqu 71-Dong 302-Hao, Futian-Qu, CN-518035 Shenzhen, Guangdong-Provinco, Ĉinio, °1966, tel./fakso: +86-755-83249852, rete fang(a)delikata.com

336. S-ro WU Xiangming, Fanxiang-Xi-lu 618-hao,Minhang-Qu, CN-201100 Shanghai, Ĉinio, °1966

337. D-ro Achim HORNECKER, Bismarckallee 22, DE-79098 FREIBURG, Germanio, °1965, rete achim(a)hornecker.de

Sinprezento de d-ro Hornecker:

Mi studis matematikon en Frajburgo kaj ankaŭ doktoriĝis en tiu fako. En la jaro 1997 mi komencis softvarfaradon por firmao en Munkeno kiel memstara softvarfaristo. Sekvis aliaj taskoj ekzemple por la Deutsche Börse kaj por Siemens en Karlsruhe. Hodiaŭ mia firmao Dr. Hornecker, Software-Entwicklung havas 4 dungitojn kaj faras softvaron por diversaj fakoj. Ni vendas programarojn por la flegado de klientaj rilatoj kaj ankaŭ por la integrado de diversaj programoj. Al la programaro por integrado ni donis la nomon "Integrilo". Ĝi estas sufiĉe sukcesa, ni nun planas aperigi la novan version 2.0 ankoraŭ en tiu jaro. Tiu estas ĝis nun mia sperto kun Esperanto kaj ekonomio. Mi eklernis Esperanton antaŭ 11 jarojn.

Terminologio

Terminologia Forumo dum UK

Mi ĵus alŝutis la enhavon de la diapozitivaj, kiujn mi prezentis dum la Terminologia Forumo en la pekina UK. Temas pri tre elementa enkonduko al XML, kun indikoj pri eblaj aplikoj en leksikografiaj kaj terminologiaj kampoj, i.a. REVO. La dosiero troviĝas je http://perso.wanadoo.fr/kursoj/prelegoj/UK89_Terminologia_Forumo.zip (zip-dosiero de 1114 kB, kiu enhavas pdf-dosieron de 8222 kB, 44 p.) Por tiuj, kiuj preferas redaktitan formon, mi nur menciis, ke simila, sed pli konciza, prelego okazos dum KAEST 2004. La kontribuado aperos en la kutima eldona serio de la KAEST-aj prelegoj.

Marc (mjb0(a)wanadoo.fr)

P.S.: KAEST (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, Dobrichovice apud Prago, 2004-11-12/14. La resumoj de la prelegoj, informoj kaj aliĝiloj ĉe <http://www.kava-pech.cz/kaest>, chrdle(a)kava-pech.cz.

Terminologiaj informoj je www.terminologio.org

La nova TEC-retejo jam estis menciita en La Merkato. Jen kelkaj pliaj novaĵoj kiujn sendis la prizorganto, Luko Jasumura (luko(a)terminologio.org) :

La reta sidejo de TEC estas, de nun, www.terminologio.org. Mi uzis la plej efikajn kaj preskaŭ senkostajn ilojn kaj lingvaĵojn por programi ĝin. Ili donas al ni, kaj la programistoj kaj la uzantoj, bonajn eblecojn por kreskigi TEC-on. Unu afero tamen estas bedaŭrinda: tiuj iloj estas programeblaj nur en la angla aŭ en la portugala lingvo. Tio ankaŭ signifas, ke multaj mesaĝoj kiujn vidas la uzanto/vizitanto estas en unu el tiuj du lingvoj. Ili ne estas tiom malfacile por kompreni, kaj mi petas vian paciencon, por ke mi povu finfine traduki ĉiujn mesaĝojn; mi laboras senĉese en tio.

Ne nur tio okazas: la propra retejo bezonas plibonigojn. Sed mi NE POVAS PLIBONIGI ĜIN ESTANTE SOLA EN LA MONDO. Mi decidis lanĉi ĝin tiel, ankoraŭ bezonante plibonigojn, ĉar TEC ne estas mia, sed NIA, kaj nun estas la momento por ke ni ĉiuj laboru por perfektigi ĝin. Mi bezonas viajn helpojn! Mi volas, ke vi aliru al ĝi, esploru ĝiajn eblecojn, provu kaj la bonaĵojn kaj la mankantajn aferojn kaj sendu al mi opiniojn, sugestojn kaj konstruivajn kritikojn. (Mi tute ne akceptas detruemajn kritikojn, kaj mi havas la rajton ilin ne akcepti! Ni estas Esperantistoj, kaj ni laboru kune!)

La nova retejo prezentas ne multajn malsimilaĵojn ol la malnova (ĉe <http://gxangalo.com/terminologio>), sed la plej grava nova karaktero estas la Reta Terminaro. De nun, ni povas konstrui nian ReTe-on kaj disponebligi ĝin al la homaro. Mi ankoraŭ ne enregistris eĉ unu vorton en ĝin, sed jam preparis ĝin por ricevi difinojn kaj terminojn. Vi sentu vin libera por sugesti terminojn ktp.

Aliaj aferoj estas la areo por elŭti dokumentojn, la TEC-kalendaro, la POD (Plej Oftaj Demandoj). Ili ne estas tute pretaj, ĉar mi ankoraŭ lernas la programilojn kaj tradukas la aperantajn mesaĝojn al Esperanto, tial mi pardonpetas pri ia fuŝaĵo dum la uzado de nia retejo.

Yahoo-grupo

Lastatempe okazas vigla diskutado pri terminologia je

<http://groups.yahoo.com/group/terminologio/>.

Interesaj broŝuroj de la Eŭropa Komisiono

Jenaj broŝuroj, faritaj por la Eŭropa Komisiono, estas senpage (rete) haveblaj, bedaŭrinde nur en la angla lingvo:



A guide to succesful communications (Gvidilo por sukcesa komunikado) (http://europa.eu.int/comm/research/conferences/2004/cer2004/pdf/rtd_2004_guide_success_communication.pdf, ankaŭ je <http://users.pandora.be/ikef/succom.pdf>) (679 kB)

Ĝi similas al la broŝuro 'Kiel diskonigi vian asocion', eldonita de UEA en 1991. La teksto unualoke celas sciencajn institutojn, sed same bone utilas por kulturaj asocioj kaj komercaj entreprenoj. Ĝi i.a. konsilas kiel oni organizu gazetaran konferencon, kio estu la strukturo de retpaĝo, ktp.

Issues in corporate governance (proksimuma traduko: Aferoj de kompania mastrumado) (http://europa.eu.int/comm/economy_finance/publications/economic_papers/2004/ecp200en.pdf, ankaŭ je <http://users.pandora.be/ikef/corpgov.pdf>) (251kB)

Dum la pasinta jardeko okazis multaj financaj skandaloj en tutmondaj entreprenoj. La broŝuro priskribas la faktojn, sed ne vere donas konsilojn por estonte eviti tiajn problemojn. Ĝi povus esti interesa el terminologia vidpunkto: multaj terminoj ne ekzistas en Esperanto.

Fotoj de la ĝenerala kunveno



**RIMARKOJ PRI LA LIBRO – LINGVA ANALIZO KAJ PROPONOJ
PRI LA “INTERNATIONAL BUSINESS DICTIONARY in nine languages
- INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO en naŭ lingvoj”**

English Esperanto Deutsch Español Français Italiano Nederlands Potuguês Svensk

Projektis, kompilis kaj redaktis F. Munnikisma, sub aŭspicio de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) – Nederlando

Eldonis: Kluwer Deventer – Antwerpen 1975 (Reprinto de eldono el 1974)
Mendebila ĉe Flandra Esperanto-Ligo, http://www.esperanto.be/fel/but/ls_serchu.php

535 paĝoj – 20 aŭtoroj entute prilaborante unuopajn lingvojn (sed 18 aŭtoroj kiel personoj) kaj Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo (C.E.K.I.T.) – Milano. Por anglaj terminoj la aŭtoroj estas A. Venture kaj F. Munnikisma; por Esperanto F. Munnikisma, G. Waringhien, A. Albault kaj C. A. Pruissen

La artikolo estis verkita surbaze de notoj por prelego kadro de Faka komisiono en la 56-a kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFE) okazinta de la 8a ĝis la 15a de majo 2004 en Sopron (Hungario) kaj adaptigo por ĝia aperigo en la revuo “La Domo”
D-ro Zlatko Hinšt (zlatko.hinst(a)hznet.hr)

ENKONDUKO

La vortaro enhavas 2812 fakajn terminojn el kampo de ekonomiko kiel scienco en formo de teorio, negoc(ad)o, komerco kaj aliaj ekonomiaj aktivecoj. Vortaro ampleksas nociojn – terminoj el mikroekonomiko kaj makroekonomiko, inkludante iujn jurajn. Sendube la aŭtoroj faradis grandajn penojn dum verkado de la libro – “Internacia komerca – ekonomika vortaro en naŭ lingvoj”. Por terminoj ekzistas terminoj difinitaj en angla lingvo kaj Esperanto. En aliaj 7 lingvoj ekzistas nur tradukitaj terminoj. La ĉefa problemo en uzado de Vortaro estas en homonimoj kiu ne ebligas pli precizan signifon por unuopaj terminoj. Homonimoj en tiu konteksto ekzistas kadre de 8 naciaj lingvoj, sed eĉ en Esperanto. En ĉi tiu artikolo oni prilaboras karakterizajn ekzemplojn. Ankaŭ ekzistas sinonimoj kiuj precipe en Esperanto ne estas necesaj, se ili ne ampleksas novajn nociojn. En iuj kazoj estas neceso por enkonduki novajn terminojn kiel anstataŭigo de ekzistantaj. Sen eliminado de homonimoj Esperanto ne povas esti preciza lingvo kies rolon ĝi vere devas havi por esprimi diversajn signifojn kaj nociojn. Sed nenio povas ellasi certajn pozitivajn ekzemplojn. Sekvas difinitaj proponoj. Analizo ampleksas ankaŭ aliajn kazojn. Vico de aperantaj lingvoj estas: Esperanto – angla – germana – franca, kaj eventuale aliaj lingvoj. Estas grave akcenti komparativan manieron de analizo en lingvaj problemoj. Kritika pritakso de tiu libro estas nepre paŝo por plua evoluigo de ekonomika kaj komerca (negocada) terminologio.

LINGVA ANALIZO KAJ PROPONOJ POR SOLVI PROBLEMOJN

En la titolo de libro estas nekonordigo inter angla kaj esperanta nomo. Ne estas bone la angla vorto “business” egaligi kun signifo “komerca-ekonomika”, sed bone estas kun “negocado”. Pli bona traduko de originala angla titolo “International Business Dictionary” en Esperanto estas “Internacia vortaro pri negocado”. “Business” estas unuavice praktika sperto, kiu plej parte respondas al amplekso de termino komerco, sed pli bone estas traduki plej simple per vorto negocado. “Ekonomiko” (angle economics sub numero 856 en vortaro) laŭ difino “estas scienco kiu havas la taskon priskribi, klarigi kaj apliki la leĝojn aŭ leĝecojn kiuj ekzistas en la interligoj inter la diversaj ekonomiaj fenomenoj. Ĉi-rilate oni parolas pri “priskriba, teoria kaj aplikata”. En vortaro oni akcentas vorton “business” kiel sinonimo de “komerco” (commerce) sub numero 450. Sed business havas sinonimon en vortoj “undertaking”, “enterprise” kaj “firm” sub 291 kiu en Esperanto estas “entrepreno”. Ekzistas termino “business economics” sub 293 kiu en Esperanto estas “entrepren-ekonomiko”. Tio estas kampo de mikroekonomiko. Kio estas kun makroekonomiko? Ambaŭ faras ekonomikon. Do, “negocada” anstataŭ “komerca-ekonomika” estas pli preciza termino. Aŭ inverse estas pli bone la anglan originalon supozi kiel nuna esperanta vortumo kaj anstataŭigi titolon al “International Commerce-Economics Dictionary”.

Unu bona ekzemplo estas kiel homonimojn en angla lingvo kiel baza linvo en Internacia komerca - ekonomika vortaro aŭtoroj ne aprobis en Esperanto. En germana lingvo ankaŭ kiel en Esperanto ekzistas tri diversaj vortoj, sed en franca lingvo du terminoj estas samaj kaj tria termino estas diversa. Vidu tri substantivojn:

1)a/ Disaĝio (Esperanto) – discount (sub numero 762)-(angla) – Disagio – perte (franca)
b/ Diskonto – discount (sub 763) – Diskont – escompte
c/ Diskonta komisiĝo – discount – Diskontprovision - escompte

Unu malbona ekzemplo estas ke en Esperanto ekzistas homonimoj – sama vorto kiu oni uzas (laŭ menciita vortaro) en tri diversaj signifoj. Vidu tri verbojn:

2)a/ amortizi – pay off (by instalments) (to)-(sub 1859) – tilgen; amortisieren – amortir; rembourser (une dette); perger (une hypothèque) en senco “nuligi ŝuldon per periodaj pagoj”.

b/ amortizi – redeem (to)-(sub 2130) – tilgen, amortisieren – amortir en senco “obligacia prunto: nuligi la pruntoprenon, periode indikante per lotado la obligaciojn kiujn oni retiros kontraŭ pago”.

c/ amortizi; deprezi – write off (to); write down (to); depreciate (to)-(sub 2807) – abschreiben – amortir en senco “administracie redukti periode la valoron de konstruaĵoj, maŝinoj, aktivaj ŝuldoj ktp, sekve de normala eluziĝo aŭ ekonomia perdo”.

Propono kaj ekspliko: Por termino sub a/ enkonduki du vortojn “elpagi ŝuldon” – ne estas bone solvi tion per enkondukado de unu nova vorto. Por termino sub c/ aprobi termino “deprezi” aŭ enkonduki alian terminon. Krom tiuj terminoj ekzistas termino “amortiza fonduso” (sinking fund – sub 2360) kiu estas “kreita dum la kurtempo de obligacia prunto por amortizi la prunto je la fino de tiu kurtempo”. Estas nepre difini amortizon kiel koston de produktado en kalkulado (kiel en angla estas “depreciation” kaj “amortization” kaj prezentata vorto en aliaj lingvoj). En Esperanto “amortizo” estas bona termino aŭ “amortizaj kostoj”.

Ekzistas nenecasaj sinonimoj, interalie kiuj povus havi iun alian signifon. Vidu:

3) Kompensaj transakcioj; var-interŝanĝoj - Compensation transactions; International barter transactions (sub numero 479) – Kompensationsgeschäfte - Transactions de compensation; trocz

Propono kaj ekspliko: Ne estas necesa dua termino “var-interŝanĝoj”. En vortaro oni konsideras tiun vorton en limigado por senperaj varaj transakcioj. Sed sub numero 145 (angla “balance of payments”) – esperantlingve “pagobilanco” oni eksplikas ke ĝi “rezultas el la internacia interŝanĝado de varoj, servoj, kreditoj kaj kapitalo”. Varinterŝanĝo povas signifi ĝeneralajn ekonomiajn transakciojn en internacia komerco kiu estas parto de pagobilanco – kiel ekzemple estas la kazo en la kroata kaj ankaŭ serba lingvoj kun termino “robna razmjena -/s inozemstvom” kaj “robna razmena -/s inostranstvom” (varinterŝanĝo kun eksterlando). Tre ofte estas uzita (uzata) termino kiel sintagmo – “ekonomiaj rilatoj kun eksterlando”. Tiujn terminojn oni uzas en statistikaj kaj en aliaj oficialaj raportoj. Terminoj inkludas tutan var-interŝanĝon – aspektojn de senparaj interŝanĝoj de varoj (varo por varo) kaj de monaj transakcioj. Ankoraŭ ekzistas vorto varinterŝanĝo – “robna razmjena” kiel ekonomika nocio en teorio pri rilatoj inter vendantoj kaj aĉetantoj en merkato ĝenerale (enlande kaj eksterlande). Estas rekomendenda enkonduki terminon “kompensaj var-transakcioj” por interŝanĝo de varo por varo sen mona transakcio.

Ekzistas ekzemploj de hominimoj, sed ankaŭ siaspeca sinonimo inter bazaj ekonomiaj kaj ekonomiaj kategorioj. La terminojn oni ne uzadas konsekvence en ĉiuj kazoj. Interalie oni intermikisas samajn vortojn en diversaj signifoj, aŭ diversajn vortojn en samaj signifoj. Vidu ekzemplojn:

4) Proponodo – Supply (sub 2499) – Angebot – l’offre – oferta (itala)

Propono kaj ekspliko: Anstataŭigi terminon “proponado” per franca vorto offre – esperante kiel “ofro”. Nome, proponado ekzistas en alia senco kiel nocioj devenanta el verbo proponi (en politika, ekonomia, ĉiutaga vivo). Oferto en menciita vortaro ekzistas

kiel termino kiu rilatas al termino “oferto” – offer sub 1757 – “la ago proponi varojn aŭ servojn, kutime en la formo de letero, cirkulero aŭ anonco.” Tio estas limigo por akcepti terminon “oferto” por “merkata propono”, sed estas pli bone diferencigi signifojn de terminoj preni novan vorton en Esperanto – “ofro”.

Verboj estas: proponi – propose – vorschlagen – proposer. El tiuj faktoj estas videble ke vorto “propono”, ankaŭ “proponado” ne estas bona por apliki en kazo de ekonomiaj kategorioj, kiel en teoria senco, tiel en praktika ekonomia vivo.

Pli bone estas uzi terminon “propono”, t.e. sen sufikso –ad kiu signifas daŭrigo, sed kiel kompleksa vorto “merkaptoprono”. Tio estas provizora solvo pli bona ol termino “propono”, ĝis la aprobo de termino kiel estas proponita “ofro”. Vidu pluajn eksplikojn sub 4).

Ekzistas ankoraŭ unu termino kun vorto propono kiu estas ligita kun bilkomerco kiel metodo kvoti akciojn sen aŭ kun nominala valoro. Tio estas:

La peca propono – quotation per unit (sub 2093) – Stücknotierung; Stückkurse; Notierung je Stück – cotation par titre; cotation par unité.

Ekzistas ankaŭ termino pri pruntepruno laŭ sistemo en kiu “oni ne fiksas la emisian kurzon antaŭe kaj subskribintoj devas mem indiki kurzon per kiu pretas partopreni en la prunto”, respektive en tri lingvoj tio estas:

Proponsistemo – tender system; issue by tender (sub 2558) – Tender Technik – émission sujette à soumission; émission sujette suivant soumission.

Tiel en Esperanto povas diferencigi terminoj “oferto” kaj “ofro”.

5) Postulado – demand (sub 719) – Nachfrage – demande – domando (itala)

Propono kaj ekspliko: Anstataŭigi terminon “postulado” per itala vorto “domanda” – esperante kiel “domando”. Nome, “postulado” ekzistas en alia senco kiel nocio devenanta el verbo “postuli” (en politika, ekonomia, ĉiutaga vivo). En vortaro ekzistas termino “postulo” kiel aparta. Parolante pri postulo ni akcentas unuopan kazon (singularo) aŭ pri postuloj ni akcentas unuopajn kazojn (pluralo). Angla vorto “demand” intermiksiĝas kun termino “claim” (sub numero 416), germana vorto estas “Forderung”, sed ekzistas franca vortoj “demande” kaj “exigence”, kaj esperanta termino estas “postulo”. Estas eble reteni terminon “postulo”. La dua ebleco estas enkonduki novan vorton en Esperanto “eksigenco” (modifoj en franca, hispana kaj portugala lingvo). Ekzistas vorto en formo de adjektivo “postula” kiel parto de termino “postula inflatio” aŭ “elspeza inflacio” (sub 720).

En la vortaro ekzistas sub numero 300 angla termino “buyers over” – “propono superas postulon” aŭ “postulpluso” kiel esperanta termino. Sub numero 2288 estas angla termino “seller over” – “postulo superas proponon” aŭ “proponpluso”. Sub 2501 ekzistas kune anglaj terminoj “supply and demand” – en Esperanto ekzistas “propon(ad)o kaj postul(ad)o”.
(daŭrigota en venonta numero)